
# Aŭstraliaj Esperantistoj



## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**

**PLENUMITA 01/04/2021 Kvincentdudekkvara eldono (unua eldono 20/09/2011)**




## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *reta-vortaro* *Freelang Vortaro* *Plena Ilustrita Vortaro* *Duolingo* *Google Translate* *Pasintaj AE eldonoj* *duolingo entute* *lingvohelpilo* *Esperanta Retradio* *Esperanta himno* *PMEGramatiko* *openclipart.*

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

## Entute 829,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **293,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **243,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)


Nun studas **219,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)

Nun studas **74,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )

Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde junio 2021)

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*

## EKSTRAĴOJ ĈE LECIONOJ EN LA "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).






**N.ro 28 de "Por Komencantoj". GRAMATIKAJ KVIZETOJ:**


Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). Unu el la kvar partoj de propozicio (= frazo) estas la Predikato (= Verba Parto). Kiuj estas la nomoj de la aliaj tri partoj?

2). Kun la necesa Verbo (kun unu el la finaĵoj as, is, os, us, aŭ u), kiu alia speco de vorto povas esti parto de la Predikato (krom ebla Predikativo)?

3). Kiuj du specoj de vorto povas esti la Predikativo?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. *Marcel Leereveld.*



MAR 25 Jam iom da sukero malhelpas la metabolon

## La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.



http://esperantaretradio.blogspot.co.at/?view=magazine

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

# Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

https://twitter.com/i/status/1245591199034929153

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**



# La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo, kunvenas de 10.30 atm ĝis 12tm la unuan kaj trian sabatojn de la monato. Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater Cafe 28-29 Suda Stejno. Unu taso da klubpagita kafo atendos vin. La ĉeestantoj tie diskutas la plej sekuran lokon por la kunveno laŭ la vetero kaj homamasoj. La 3a de aprilo estos la unua sabato. Venu ! *Roger Springer*

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajno post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA.

## Humurbildojn




Multe da humurbildoj (kun komentoj) mi prenas el E-retpaĝoj! Mi nur por iuj BILDOJ (eble triono?) aldonas mian komenton (rimarkon, ŝercon)...Mi estas nur KUNaŭtoro de iuj bildoj! Sube estas ligilo al mia magazino de jam prezentitaj humurbildoj... Iru tien kaj prenu! https://tiny.pl/rn9gc





Kiam mi komencos diri, ke vi estas bela, bonvolu ne vendi plu alkoholon al mi !




| https://tiny.pl/rn9gc_ | Kun elkoraj salutoj | ***Marian*** *ZDANKOWSKI* |
|---|---|---|

**La tialo pro kiu mankas informo pri via klubo estas ke via klubo ne sendis ĝin al AE**

Ne estas ke mi estas tiel inteligenta, nur ke mi restas kun problemoj pli longe. *Albert Einstein*



***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

## Pandemia kurso de la Monda San-Organizaĵo

En la retejo de la Monda San-Organizaĵo oni nun havas la tradukon al Esperanto de ĝia kurso pri KOVIM-19. Vidu ĉe:

https://openwho.org/courses/enkonduko-al-KOVIM-19

Tio okazis pro komenca kontakto de Adam Eng kaj pro traduka/kunordiga laboro de Herman Deceuninck, helpata de kelkaj aliaj esperantistoj.

## Esperanto-radioreklamo - 1892 fojojn

El Hungario nia kolego Szilvási mesaĝas:

"Daŭrigante malnovan kutimon, denove ni mendis **12 sekundan radioreklamon** por 4 semajnoj en 26 hungariaj lokaj/regionaj radiostacioj! Tia radioreklama kampanjo ne rezultos aliĝon de centmil homoj al la sekva Esperanta kurso – sed **la nuna celo ja estas** tute ne tio. Laŭ esploroj de reklam-psikologoj por atingi aĉet-decidon aŭ por elformi pozitivan bildon pri iu produkto oni devas **alpuŝi 8-10-12 fojojn** iun pozitivan informeron al la potenciala onta konsumanto.

Tiu regulo **validas ankaŭ por la sukceso de Esperanto.** Tial estas grave aperigi informerojn pri Esperanto en kiel eble plej variaj komunikaj kanaloj: pagitaj interretaj reklamoj, gazetartikoloj, mencioj en televido, leksikonoj, lernado de Esperanto fare de iu konato, ebleco pri lingvoekzameno, vojaĝaj informeroj, lingvopolitiko (samrajteco, justeco, ktp), insignoj, Eo-emblemoj, interretaj forumoj, mencioj en nacilingvaj fejsbukaj afiŝoj kaj alparoloj, Eo-lingvaj versioj de retpaĝoj, alparoloj sub nacilingvaj retaj gazetartikoloj, ktp... . La nuna radioreklamo estas unu peco en tiu listo, **unu eblo por alpuŝi pozitivan informeron** pri Esperanto al aŭskultantoj.

## Kiel modele komuniki la mojosecon de Eo?

Esperanto estas mojosa! – *Esperanto is cool*! Jen ekzemplodona kaj mirinda filmo de TEJO, kiu klare montras niajn tutmondecon kaj idealismon.




Sendis al AE *Katja Steele*



**https://www.youtube.com/watch?v=bPU_JXEA1MA**

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***




# OWEN LONERAGAN 97



Elkorajn gratulojn al Owen Loneragan, 97 jaraĝa je la 26a de Marto.
Fidela Esperantisto ekde ĉirkaŭ 1970.🎂🍾🎶🍷

*Vera Payne.*




## Povaĵoj, Iloj, kaj Poviloj.

Ĉiu Kliŝo implikas multe pri rolulo, plej grave liaj verŝajnaj kapabloj kaj ekipaĵo. Se vi rolas kiel Harega Barbaro (3), ni povas supozi ke via rolulo estas komforta pri klingoj kaj bataloj. Li verŝajne estas grimpanto, kuranto, kaj tutnokta diboĉemulo. Li verŝajne posedas preskaŭ unu fortikan manarmilon kaj (espereble, graceble) tutan lumbotukon. Se vi rolas Psika Lernejknabino (3), vi verŝajne havas la povon sensi (kaj esti ektimegita per) la psikometrikan restaĵon longdaŭran ĉe murdosceno, kaj eble posedas beletan pluŝan dorsosakon plene de lernejaj provizoj. Se vi rolas Fripona Spacopirato (3), vi povas uzi ĉiujn specojn de pirataj friponaj spacoaferoj, kaj vi verŝajne posedas radiopafilon, kaj eble brokantan stel-ŝarĝoŝipon. Kiam estas iu dubo pri la kapabloj aŭ "Iloj de la Metio" de via rolulo, diskutu ĝin kun via LM>.

Iloj de la Metio venas "senkoste" kiel parto de ĉiu Kliŝo, sed ili estas vundeblaj pri perdo aŭ damaĝo, kiu (de tempo al tempo) kripligas aŭ limigas la potencon de la Kliŝo. Fripona Spacpirato, sen sia stel-ŝarĝoŝipo, perdas la kapablon porti rabaĵon al foraj sunoj ... dum Psika Lernejknabino perdas neniom de sia kapablo esti ektimigita per murdoscenoj se ŝia pluŝa dorsosako estas forŝtelita. Harega Barbaro (3), trudita en fosaĵ-batalo sen sia fidita klingo, povas ankoraŭ fidi siajn nudajn manojn, sed li funkcios ĉe duon-ludkuboj - nura Harega Barbaro
(2) - ĝis li denove estas ĝuste armita. La sendorsosaka Lernejknabino eble alfrontos similajn punojn kiam estas la tempo por fari siajn hejmtaskojn..

Dum la daŭro de la aventura vivo, bonŝancaj esploristoj eble malkovros sorĉitan kaj/aŭ superteĥnologian kaj/aŭ alie apartan ekipaĵon. La plej baza speco estas nomita Bonifiko-Ĵetkuba Ilo (tiaj aĵoj permesas vin ĵeti pluan ĵetkubon, aŭ pli, kiam vi uzas ilin) sed ekzistas aliaj specoj de "aparta" esti trovita, en la formo de alia lud-reguloj ("Per tiu eksperimentanta programaro, vi povas reroli iujn 1-ojn"), en-mondaj povaĵoj (" Nur Stradivariuso povas esti uzita por delogi Vampiro-Princon") aŭ eĉ miksitaj bonaĵoj kaj priskriboj ("Dum vi manipulas la Glavon de Graco, vi ĉiam rulas ĵetkubojn preskaŭ egalajn al via kontraŭulo, sed vi devas ŝpari lian vivon se vi gajnas".



Dankon Ŝohano *(Shayne Power)*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

# Universala baza enspezo (UBI)



**Por pli kontentiga kaj sekura mondo.**

## Kio estas Mono?

Mono estas la havebla energio en la mondo.
Kontrolata per treege malmultuloj. La elekto estas la Homaro aŭ la Militistoj





Ekonomiaj sklavoj kaj malamo/timo per mensogoj estas esencaj por ebligi militojn.
La insultoj de la parlamentanoj al ĉinujo jam kostas la aŭstralian ekonomion la vendojn al ĉinujo de vino, hordeo, omaroj, kotono, ktp plus manko de turistoj, studentoj, ktp plus la aĉeto de multkostaj militaĵoj por la ebla milito.


**Ĉu la malsamaj politikaj sistemoj en Ĉinujo kaj Aŭstralio/Usono meritos militon?**

Usono havas **du politikajn partiojn sed politikoj ne ŝanĝiĝas** kaj ne helpas sian loĝantaron.
Ĉinujo havas **unu partion sed ĝiaj politikoj ŝanĝiĝas** kaj riĉigas sian loĝantaron.



**25 milionoj kontraŭ 1,444 milionoj.**





**Surviva solvo, estu amikoj**

*Roger Springer*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917)



# Ni lasas nian mondon putriĝi.

## NIA PUTRIĜANTA MONDO .

Ekzistas pluraj situacioj, en kiuj la homaro maltraktas nian mondon tiel, ke ĝi fariĝos pli malfacile enloĝebla. Unue pro la malpurigado de la atmosfero per la produktado de venenaj gasoj. Ĝi kondukos al plivarmiĝo de la veteroj en la mondo. Pluraj landoj faras la minimumon por haltigi tion, sed multaj, kiaj Aŭstralio, ne faras sufiĉe. Pluraj landoj estas tro malriĉaj por fari ion, sed ĝenerale ne ili kaŭzas la malpuron. Do estas preskaŭ certa, ke venontaj homgeneracioj havos pli kaj pli grandajn problemojn. Pro ĉi tiu kaj aliaj mistraktoj de la tero ni postlasos al niaj postvenuloj malpuran mondon, kiun poste purigi estos tre malfacila aŭ neebla. La cinika respondo estus "Lasu la mondon kaj la homaron forputriĝi".



Mi proponas, ke en A.E., kaj ĉie, ni pli diskutu kiel malpliigi la dekon da diversaj situacioj kiuj kaŭzas kaj pli kaŭzos la putriĝon de la homa agado. Legante proponojn pri tio helpos nin ŝanĝi niajn proprajn agojn kaj la agojn de niaj registaroj. Granda bezono estos, malsekretigi la dirojn kaj la agojn de niaj registaranoj. Fakte, granda bezono estas, devigi ilin pli malferme kaj honeste interrilati kun ni, kaj ankaŭ inter si. Ofte oni sekretas, se onia agado estas malĝusta aŭ malhonesta. Malsekreteco estas granda komenco por savi la mondon, kaj ne malutilas al iu ajn honesta persono. *Marcel Leereveld.*

## PROVU VIDI OPEROJN .

"Opera Australia" prezentos en Majo en Melburno du operojn, Aida kaj Ernani. El la deko da tre popularaj operoj de Verdi, Aida estas la laste verkita. Li ne mem elektis verki ĝin: ĝi estis mendita de la organizantoj de la festo por celebri la oficialan malfermon de la Suez-kanalo. La malfermon oni devis prokrasti kelkajn jarojn, ĉar Verdi bezonis multe pli da tempo ol por siaj aliaj operoj, precipe ĉar li volis ke la enhavo samu al la historiaj egiptaj okazoj prezentitaj en ĝi. Ĉe la fino de la operprezento la publiko aplaŭdis dekojn da fojoj. La egiptanoj ne tre ŝatis la enhavon, pro la amkaŭzita perfido de la fama ĉefo de la armeo. La enhavo havas multe da famaj arioj, favoraj ĉe la plej grandaj gekantistoj. Mi vidis la operon dekojn da fojoj, en Nederlando kaj en Aŭstralio. En Sidneo ĝi prezentatis eksterdome, kun la necesaj elefantoj kaj kameloj.



Ernani, ankaŭ de Verdi, estas neofte prezentata, parte ĉar la itala publiko ne ŝatis ke la glora ario aperas ne en la fino de la opero sed ĉe la fino de la tria akto. La publiko ne sukcesis ke Verdi ŝanĝu la operon, kiel ili kelkfoje sukcesis en la pasinteco ĉe famaj komponistoj, kiaj Verdi kaj Puccini kaj Mascagni. Unu arion de la opero vi aŭdos ĉe mia funebro, ĉar mi petis aŭdigi la finan arion de la tria akto de baritono kaj soprano kun ĥoro, en kiu ario la hispana reĝo Don Carlos vizitas la tombon de Karlomagno por laŭdi lin kaj promesi al ĉiuj ke li agos laŭ Karlomagno kaj ke li pardonos al ĉiuj siaj malamikoj, kiam oni faros lin la nova Sankta Roma Imperiestro. Mi elektis tiun arion unue pro ĝia melodio, sed ankaŭ ĉar Karlomagno estis la unua regnestro kiu sukcesis krei Unuiĝintan Eŭropon, kiun idealon mi tre ŝatas. *Marcel Leereveld.*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917)* **SOLVO DE LA KVIZETO**



1). La tri aliaj frazpartoj estas la Subjekto, la Objekto, kaj la Adjektoj.
2). La Infinitivo.
3). Substantivo kaj Adjektivo.

*Marcel Leereveld.*

# El Brizbano

Jarkunveno en Brizbano




Tara, Oscar, Claire

Bedaŭrinde ĝi estis la lasta kunveno de Oscar kiu translokiĝos baldaŭ al Geelong.
Ni bonvenis novajn membrojn Tara kaj Michael al nia Societo *Petro Danzer*



**3ZZZ** En la elsendo de la 29a de marto aŭdeblas longa intervjuo de Duncan Charters pri la demando : " Ĉu lingvo sufiĉas por interkompreniĝo? " La respondo gravas por la esperantistoj, kiuj multe vojaĝas kaj renkontas homojn de diversaj kulturoj *Franciska Toubale*

La sufikso "-i-" por landoj estas oficiala sed gramatike malĝusta,
do estas pli bone uzi la Zamenhof'an sufikson "-uj-".

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***